

La letero

de l' *Akademio de Esperanto*

N° 3 - Aprilo Majo Junio 1988

ISSN 0986-1181



Unu nuancitan aspekton de la Akademia laboro, mi ne povoscius nomi pli trafe ol " la jura aspekto ".

Blindumitaj de la "ekstera iluzio" * iuj erare opinias, ke ĉiuj Akademianoj devus esti lingvistoj! Tio estus perfidi la intencan de Zamenhof, kiam en 1905 li elektis la unuajn membrojn de niaj lingvaj institucioj el la elito de la Esperantistaro, sed neniel ekskluzive el la lingvistoj.

La Akademio ja fondas siajn laborojn sur lingvistikaj konstatoj, faritaj jen de Akademianoj, jen de aliaj. Sed ĝiaj decidoj estas juĝoj, kiuj konsideras la tutan lingvon, kiel unuon, kaj ne nur izolajn lingvistikajn faktojn. Lingvisto konstatas la faktojn kaj la faktoj estas mil kaj unu!

Lingvisto konstatas ekzemple, ke en iuj Germanaj landoj kelkaj uzaŝ la participojn tempisme, ke en Latinidaj landoj oni ofte neglektas la akuzativon, ke en iuj Aziaj landoj oni emas prononce konfuzi la du likvidojn *r* kaj *l*,...

Per tio la rolo de la lingvisto finiĝas: li science konstatis; por li aperas dialektiĝoj kaj punkto fino! Lia laboro estas finita!

Sed la rolo de Akademianoj kiel individuoj kaj de la Akademio kiel tuto nur komenciĝas per tio. Ili kaj ĝi devas teni la unuecon de la lingvo: ili juĝu la aferon kaj donu sian verdikton! Ĉiuj lojalaj kaj laŭcelaj Esperantistoj estos la ĝendarmoj, kiuj tenos la decidojn en daŭra kaj konstanta apliko: ili klopodos komenci per si mem, ili instruos kaj instigos la aliajn.

Por certigi sian juĝon la Akademio posedas "korpuson", referencan tekstaron, kies kerno ja estas la Fundamento. Sed por pli delikataj demandoj al tiu kerno aldoniĝas la karno de la tuta Zamenhova verkaro kaj se necese preter kaj apud ĝi la verkaro de niaj plej bonaj aŭtoroj. Aliparte tiu kerno estas aktualigita de la diversaj decidoj de la lingvaj institucioj mem: de la Lingva Komitato kaj ties Akademio, kiuj fandiĝis en la nunan Akademion.

André ALBAULT
Prezidanto de la
Akademio de Esperanto

* Aludo al la samtitola artikolo en la Revuo Esperanto, Dec. 87, p. 210

OFICIALAJ INFORMOJ de la AKADEMIO de ESPERANTO

Sendependa lingvo-institucio fondita de D-ro L.L.ZAMENHOF en 1905

Cirk. 155- Ald. C

REGULARO PRI APROBO DE FAKAJ TERMIN(AR)OJ.

I. Temoj. Oni povas peti al la Akademio pri kontrolo de :

- a) Unuopa termino aŭ limigita kvanto da terminoj ne establitaj aŭ pri kiuj estas neunueco en la uzado;
- b) Pli aŭ malpli komplete terminaro de difinita fako;
- c) Lernolibro pri difinita fako aŭ temo, enhavanta fakajn terminojn.

II. Petantoj.

a) Unuopan terminon aŭ limigitan kvanton da terminoj povas prezenti por pristudo, kritiko aŭ eventuala aprobo kiu ajn esperantisto kompetenta pri la fako, al kiu la termino(j) apartenas.

b) pli vastan terminaron povas prezenti esperantista faka asocio de la koncerna fako, sed ankaŭ grupo da kompetentuloj aŭ unuopa kompetentulo, kiu ellaboris la verkon, prefere pere de la koncerna faka asocio esperantista, se tia ekzistas.

c) Fakan lernolibron povas prezenti esperantista faka asocio, kiu iniciatis la ellaboradon de la verko, la verkinto(j) aŭ tradukinto(j) de la verko, aŭ la eldonisto.

La studotan materialon oni sendu en 3 ekzempleroj al la Direktoro de la ĉi-sube menciita Komisiono de la Akademio.

III. Pritrakto.

La Akademio starigas Komisionon pri kontrolado kaj aprobo de terminaraj verkoj. Ricevinte demandon pri termino(j), terminaro aŭ faka lernolibro la Komisiono ekzamenas la proponitajn terminojn el lingva vidpunkto laŭ la Fundamento de Esperanto kaj raportas al la Akademio. La voĉdono de la Akademio pri la raporto ampleksu eventualan decidon ĉu doni al la petinto la rajton noti sur la eldonaĵo : "Aprobata de la Akademio de Esperanto".

La Direktoro de la Komisiono pri Akademias
Aproboj,
Prof. d-ro Carl STÖP-BOWITZ

REPRESO DE LA OFICIALAJ DECIDOJ DE LA AKADEMIO ESTAS DEZIRINDA EN ĈIUJ PERIODAĴOJ.

TELEMATIKO KAJ ESPERANTO

Sekve al informoj donitaj de S-anoj CORNICE kaj ROTSAERT (en ESPERANTO, 1987, p.222), stariĝis korespondado inter la nomitaj kaj la subskribinto en la celo daŭre informi la legantojn de LA LETERO.

Provizoraj konstatoj estas:

I° Telex: speciala komunik-reto por profesiuloj, ĝi uzas telegrafiajn dratojn kaj estas disvastigita en la tuta mondo. Ne provizita per diakritoj, ĝi ebligas al ni uzi nur la h-diakritan alfabeton de la Fundamento (ch, gh ...)

2° Teletex: normo kaj sistemo vaste alirebla por la "privata" publiko, ĝi uzas telefondratojn; sed pli nova, ĝi ankoraŭ estas konata nur en Okcidenta Eŭropo, en Norda Ameriko kaj en Sud-Afriko. La normo Teletex estas riĉa je diakritoj (12), specialaj literoj naciaj (29) kaj diversaj signoj (37), krom la dek ciferoj. Tamen ŝajnas, ke la krono (∩) kaj la bikorno (∪) estas reduktitaj al nur unu kaj sama signoj; sed tio ne povas doni konfuzon en kiu ajn lingvo. Sekve eblas per Teletex korekte tajpi verŝajne la grandan plimulton el la Latin-skribaj lingvoj, inkluzive Esperanton (ĉapelo ^, krono ∩). En iuj kondiĉoj eblas sin konekti al la Telex-reto, sed tiam oni subiĝas al ties limigitaj ebloj. Tiu normo estas do pli riĉa ol la konata ASCII-normo.

.../...

KRONIKO DE LA NUNTEMPO



Bondeziroj kaj celo por "LA LETERO"

La du unuaj numeroj estigis amason da poŝtaĵoj, kiuj konfirmas favoran akcepton de gelegantoj. Pluraj bondeziroj en ili esprimitaj montras, se ankoraŭ estus bezone, kiel prisopirata estis tia ligilo inter la Akademio kaj la geesperantistoj. Nur iom post iom kompreneble "La Letero" povos klopodi por respondi al ĉiuj aspiroj kaj sendube ĝi ne restos nur kvarpaĝa; sed...komenco ne estas facila en la nuntempo,

kiam tiel multekostas la poŝto por sendaĵo tra la mondo! Kelkaj ŝatus ekzemple, ke debatoj pli teknikaj pri fakaj terminologioj trovu lokon sur ĝiaj paĝoj: ĉi-cele necesas, ke venu taŭgaj demandoj kaj kontribuaĵoj. Ja "La letero" fariĝos tia, kia ĝin formas la interesiĝantoj!

Sed la esenca celo restas informi ilin pri la laboro de la Akademio kaj ĉi-ties membrojn pri aktualaj demandoj de la lingvouzantoj; laste sed ne malpli grave "La Letero" tiel firmigos la Akademian aŭtoritaton des pli necesan en la nuntempo, ke denove kaj senkonscie pri la risko pluigi lingvan disduiĝon oni kuraĝas relanĉi la tempisman teorion de participoj!

La redaktoro

(Telematiko kaj Esperanto)

Aperis nova normo de ISO, ŝajne simila al la Teletex-normo: ni ankoraŭ ne scias, ĉu ĝi identas; sed evidente ambaŭ neprigas la uzadon de "mortaj klavoj" (aŭ pli ĝuste de ekivalentaĵoj de la "m.k.", ja propraj al la mekanikaj tajpiloj).

La menciita maŝino de la konstruisto SAGEM(komputoro plus mens-varo), kiu ankaŭ utilas kiel teksto-trakta maŝino, estas nur unu el la maŝinoj ekspluatantaj la Teletext-normon:dekduo da aliaj konstruistoj konkurencas sur la merkato. La prezoj de tiaj maŝinoj ŝajne estas ĉ.55 000 - 60 000 FF.

3° Telekopiiloj, popularaj ĉefe en Japanio, konkurencas la du aliajn sistemojn:ili kapablas telesendi eĉ manskribaĵojn, krom ĉiajn grafikojn kaj desegnojn.

Ni daŭrigos tiun rubrikon, ne nur por praktika celo sed ankaŭ omaĝe al ZAMENHOF :mi ie legis, ke li iam planis skribmaŝinon; sed estas certe laŭ la tajposkriptoj, kiujn Ludovikito ĵus publikigis (pri la Bibliaj libroj), ke la Iniciatoro posedis maŝinon kun du aŭ pluraj "mortaj klavoj":unu tajpis du ĉapelojn (minusklan kaj majusklan), alia - tre klaran kronon (☺).

A.A.

LA LEGANTOJ SKRIBAS ...

El la multaj leteroj jam ricevitaĵoj leviĝis pluraj demandoj pri la fondiĝo de la "Amikoj de l'Akademio de Esperanto"(AAE) kaj ĝia agado kaj pri la eventuala kreado de lokaj sekcioj de AAE.

Kiel jam dirite,la fondiĝo de AAE rekte respondas al la decido de la Estraro de la Akademio de Esperanto plene ludi sian rolon de protektanto de la Lingvo Esperanto laŭ ĝia Fundamento kaj de kontrolanto de ĝia evoluo.Fondita en majo 1987,ĝi,laŭstatute, celas "diskonigi la laborojn de la Akademio de Esperanto, faciligante la dissendadon de ĝiaj studoj kaj alportante al ĝia aktivado,ĉian rimedon materialan kaj finanĉan".

La nuna konsisto de la Estraro de AAE estas la jena:

Prezidanto: André ALBAULT, prezidanto de la Akademio de Esperanto

Sekretario :André BOURDEAUX

Kasisto:Jean THIERRY, sekretario de la Akademio de esperanto.

Pri la kreado de lokaj sekcioj de AAE, nenio efektive malhelpas, ke pluraj Amikoj en sama urbo kunvenu inter si ekzemple por komuna manĝo kaj ĉe tia okazo interŝanĝu ideojn pri aktualaj demandoj.

Sed tion ne necesigas formalan strukturon.

J.T.

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

6.D. "Ĉu 'la Akademio' aŭ 'l' Akademio ' estas aŭtenta ? (Pastoro A. BURKHARDT)

R. Via demando rilatas al la du titoloj: "La Letero de l' Akademio" nomo de nia bulteno kaj "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto". Tiuj du titoloj absolute obeas la Fundamenton. Efektive en la Fundamenta Ekzercaro oni povas legi en Ekzerco 27 tutan pecon dediĉitan al nia artikolo kaj al ĝia elizio. Pri la elizio jen la koncerna frazo:

Anstataŭ "la" oni povas ankaŭ diri "l'" (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo).

Alidire la Fundamento donas la permeson uzi ekzemple " de l'", tra l'..." tute libere, t.e. ne devige en poezio, kiel iuj kredas. Ordinare la elizio de la artikolo povas okazi nur post vokale finiĝanta prepozicio, sed neniel antaŭ vokalo aŭ eĉ en aliaj kondiĉoj. Poezia licenco, parolturno kiun oni povas trovi en poezio sed neniel en prozo, male povas esti elizio de la artikolo en aliaj kondiĉoj:

Por reunigi l' homaron

aŭ

L' espero, l' obstino kaj la pacienco

Tiujn du versojn eltiritajn el 'La Vojo' kaj el la 'Preĝo sub la Verda Standardo', du poemoj de Zamenhof, ĉiu konas. Sed tio estas rezervita por la poezio. Ekzemple, konata titolo kiel 'L' omnibuso ' estas ne imitinda.

A.A.

7.D. "Kiu estas la oficialaj publikaĵoj de la AdE ?" (F. BOYET).

R. Laŭ la Statuto, ili estas du: "la Oficialaj Informoj de la AdE" kaj la "Oficiala Bulteno de la AdE". Krome ekzistas - sed nur por interna uzado - la "Cirkulero". La "Oficialaj Informoj" estas informilo sendata al nia internacia gazetaro pri ĵus faritaj decidoj. Ili nun aperos en "La Letero", organo de la asocio "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto" (AAA). Post mia prezidantiĝo, ni komencis "novan serion". Kvar informiloj rilatis la elektojn, jen de kandidatoj al la Akademio, jen de funkciuloj por la diversaj postenoj; la du aliaj donis lingvajn decidojn: "Rekomendoj pri la landnomoj" kaj "Prepoziciaĵo por la subjekta suplemento". Ĉiuj principe aperis en la internaciaj periodaĵoj. Sed ni konstatis, ke ne ĉiuj regule aperigis ilin ...

La du konataj "Oficialaj Bultenoj" estas la laste aperintaj; ili aperis sub la numeroj 9 kaj 10. La unua el ili estas pli konata sub la nomo "Aktoj de la Akademio (1963 -1967)"; ĝi entenas i.a. la ĉapitrojn: "Enketo kaj decidoj pri la pasivaj participoj" kaj "Enketo kaj decidoj pri la vortfarado".

La dua titoliĝas "Aktoj de la Akademio, II (1968-1974)"; ĝi entenas du partojn: en la oficiala parto oni trovas du ĉefajn sekciojn: "la Oka Oficiala Aldono al U.V." kaj la "Baza Radikaro Oficiala". La neoficiala proponas du aliajn sekciojn: "Kompleta inventaro de la pasivaj participoj en 'La Rabistoj'" kaj "Pri la landnomoj".

A.A.

8.D. "Mi ĵus legis la novan eldonon de "Beletro" de Waringhien kaj mi notis, ke li uzas la prepozicion (?) far. Kiel akordigi tion kun la "Oficialaj Informoj" n° 5" (F. BOYET).

R. La informilo memorigas la Fundamentan uzadon de de ("Si estas amata de ĉiuj"; la kanto de la birdoj...). Estus kontraŭ la Fundamento ne uzi de en tiuj kaj tiaj frazoj. Sed konsiderante, ke klareco estas supera sed ne preskribita leĝo de nia lingvo, la Akademio allasis, ke en pli kompleksaj frazoj oni rajtas uzi alian aŭ aliajn rimedojn: ĝi allasis por tia uzado la esprimon: fare de. La Akademio nek rekomendis, nek kondamnis la formon far. Mi, ne oficiale, povas diri, ke la granda plimulto de Akademianoj malkonsilis la elizian formon "far" de dum tre forta grupo favoris far. (Sed ĝi ne estis sufiĉa por atingi la 2/3 de la voĉoj, kiel laŭstatute necesis en ĉi tiu kazo). Preter tio estas la privilegio de kiu ajn verkisto kaj aŭtoro provi uzon de neoficialaj elementoj "je siaj riskoj kaj danĝero", laŭ la formulo de unu el miaj famaj antaŭuloj, Rektoro BOIRAC.

A.A.